After careful study of the membership for those having the requisite qualifications for the various offices, the Committee has selected the following candidates, to be voted on: *For President*, Dr. Cecil Stockard of Bradenton, Fla. The Doctor is too well known for his long and faithful service to need elaboration of his merits. You all know him.

For Vice-President, Mr. Robert Karlson, of Montreal, Vice-President and executive head of an important business. Though not so well known in the Eastern USA, his work for the Esperanto Movement is widely known in Canada, England and on the Pacific Coast, and his excellent publicity has resulted in many requests for information, and big sales of Esperanto literature. *He is the man* to give the Esperantists of the Canadian section of the Esperanto Association of North America their "Place in the Sun".

For Secretary, Mr. G. Alan Connor, now editor of the "American Esperantist" is fully qualified in every way. In the past six years he has enlisted more new members than all others combined—also brought about renewals of more old members than any other. His purchases of Esperanto literature has been almost as much as all others combined. He has surrounded himself with a staff of first-class Esperantists—all very active in the movement the past few years. Since my advent to the office of Secretary, he is the only person, with the necessary qualifications, to indicate his willingness to serve as Secretary. I have had him in mind for several years, and it gave me thrills of pleasure and thankfulness when he consented to 'take over' if elected.

For Ass't Secretary, Mrs. Doris T. Connor, M. A., has been ably assisting Mr. Connor on the "AE" staff. She has been my best help during the past two years—even though 225 miles away. Mr. and Mrs. Connor are Cseh-Institute (Holland) graduates, and first-class Cseh teachers.

For National Treasurer, Mr. Eugene A. Knight of New York, whose business is banking. An enthusiastic worker in the Esperanto field for many years. He is well qualified for the position.

For Kumestro (adviser), Joseph Leahy, Washington, D. C. I had decided to drop out entirely from official connection with EANA (after 12 long years), but the other candidates, as well as many outside the official family, seemed to think that my years of experience qualified me for something, and insisted that I come in.

It has long been my idea that the Secretary, Ass't Secretary, and Treasurer be within easy reach of the Central Office for hurried consultations, and general co-operation, and my long experience with the personnel of EANA, I feel, qualifies me to know "Who's Who" for the official family.

Now I have to get out of harness, and work for the Leahy family. Sincere thanks to all members for their co-operation through the years.

— JOSEPH LEAHY

SAN-FRANCISKO KAJ ESPERANTO

HELENE WOLFF-KLEVE

Redaktista noto: F-ino Wolff-Kleve estas Delegito de IEL en San-Francisko, kie ŝi ageme laboras por Esperanto. Ŝi estas elektita kiel Oficiala Reprezentanto de EANA ĉe la Konferenco.

Kelkajn semajnojn antaŭ ol la Konferenco de Unuigitaj Nacioj por Internacia Organizo komenciĝis, mi sugestis ke EANA sendu delegiton el Los Angeles al la Konferenco. Post kelkaj interŝanĝoj de leteroj, oni proponis ke mi akceptu la postenon. Ĉar la tempo forflugis, mi akceptis por ke ni faru kiel eble plej multe.

La 27-an de Aprilo mi ricevis leteron de S-ro Connor, kio sciigis al mi ke mi estas Reprezentanto de la "Amerika Esperantisto". Sed, tiu ne helpis tro multe, ĉar oni devas havi *oficialan* enirpermeson de la Departemento de Ŝtato por eĉ iri al la loko de la Konferenco. Ni ne sukcesis ricevi tiun permeson — ja miloj da aliaj organizoj petis kaj ne ricevis — sed estas kaj estos, mi opiniis, oportuno por alparoli al diversaj personoj, eminentuloj, ĵurnalistoj, k.t.p. Do, pere de la helpo de sufiĉe granda monsumo, donita de nia bonkora Prezidanto Stockard, mi kuraĝe komencis la laboron!

Jen estas kelkaj raportoj el mia "menuo" de laboro:

Marde la 8-an de Majo: Ni ĉiuj, el la "Bay"-distriko, subskribis la petskribon de samideano Smith, kaj sendis ĝin kun letero al la Gvida Komitato. Ni petis ke ili konsideru la ideon de neŭ-

trala interlingvo kaj respondu al ni pri la ebleco por intervjuo.

Jaŭde la 10-an: Mi alportis leteron al S-ino Hastings, Prezidentino de la Asocio de Gepatroj kaj Geinstruistoj en Nord-Ameriko. La letero atentigis ŝin pri Esperanto. Mi iris al du ĵurnaloj por enmeti anoncojn pri Esperanto. Mi pagis per la mono, kiun mi ricevis de la diversaj samideanoj. (Dankon)! Ĵus kiam mi eniris en la redakcejojn mi hazarde renkontis la gravan koloniston Chester Rowell. Mi donis al li la AE, kaj li promesis legi la unuajn du artikolojn!

Vendrede la 11-an: Mi ĉeestis kun S-ro Smith kunvenon de Konferenc-partoprenantoj, kiuj havas specialan intereson pri kulturaj problemoj. Kelkaj vortoj instigis min paroli dum la diskuto, kaj do, ili aŭdis pri Esperanto kiel kultura faktoro.

Dimanĉe la 13-an: Hodiaŭ aperis mia anonco en la "Kroniko de San-Francisko". La Prezidentino de la Mond-Civitano-Grupo ("World Citizenship Group") telefonis al mi kaj invitis min al vespermanĝo de sia grupo. (La manĝo kostas \$2.50. Bone ke mi havas monon!) Post la vespermanĝo (jes, mi ĉeestis) S-ro Atkinson faris resumon de la Konferenco, kaj poste mi kap-

tis la okazon por danki lin kaj demandi lin kion li opinias pri Esperanto. "Ho, tio estas bona sonĝo, kiu efektiviĝos en la estonto." Mi donis al li la AE, kaj li promesis legi la du unuajn artikolojn. Sed dum mi disdonis, du sinjorinoj diris, "Ho, Esperanto . . . mi petas, donu al mi ekzempleron!" (Intertempe multe da alparolo, vizitoj, k.t.p.)

Merkrede la 30-an de Majo: Hodiaŭ la telefono sonis. Estis la sinjorino de la Traduko-Servo de la Konferenco. Ŝi diris (antaŭ kelkaj tagoj mi demandis) ke estas unu sinjoro en la Servo, S-ro Sergei Mikhailov el la Rusa Stabo, kiu estas spertulo pri Esperanto. Ŝi diris al mi la adreson, kaj duonhore poste mi jam alvenis ĉe la Hotelo, kie troviĝas la Rusa Oficejo. S-ro Mikhailov venis tuj je mi peto, kaj parolis dum duona horo. Li promesis al mi fari ĉion eblan, se mi aranĝos diskut-vesperon, kaj kompreneble li ĝojus ankaŭ veni.

Ĵaŭde la 31-an: Hodiaŭ mi ricevis de la oficejo de S-ro Stettinius dankon pro la sendo de ekzemplero de la AE.

Dimanĉe la 10-an de Junio: Jen, estas la dua Dimanĉo dum kiu mi restas hejme por skribado de leteroj. Antaŭ unu semajno mi invitis multajn delegitojn, la urbestron de San-Francisko, la Asocion de Pres-Asocioj, du ĵur-

nalojn de San-Francisko, kaj kelkajn aliajn organizojn, al prelego kiun mi faris en granda ĉambro ĉe la Domo de la Ruĝa Kruco. Venis nur 17 personoj kaj unu eta kato. (Mi estas certa ke la kato parolas "Bazan Anglan"!)

Sed la atmosfero estis plejparte favora, kaj oni diris al mi ke mi estis tre klara en tio kion mi diris. Kelkaj el la Delegitoj diris antaŭe ke ili volas veni, do mi havas nun bonan kialon por demandi kial ili ne ĉeestis, kaj ĉu mi povas nun persone paroli kun ili. Kaj al du aŭ tri organizoj mi intencas telefoni, kaj se ili tre bedaŭrus ke ili ne povus veni, mi proponos ke mi volonte parolos antaŭ ili. Ni vidu kiu estas pli obstina, ĉu la San-Franciskanoj aŭ la Esperantistoj!

La Konferenco baldaŭ finiĝos. Nia tasko nun estas kontakti la I.E.L. Delegitojn en ĉiu lando por ke ili ankaŭ skribu aŭ kontaktu siajn registarojn. Kelkfoje dum mia klopodado, mi havis la ideon ke mi tre bone laboris kaj interesigis multajn personojn. La invitoj al diversaj delegitaroj ja ankaŭ atentigis ilin pri Esperanto. La urbestro skribis ke 'li treege bedaŭras, sed li ne havas tempon por veni'. Nu, iuokaze li ricevis la vorton Esperanto, eble por la unua fojo en sia vivo. Mi nun esperas iomete da sukceso por la lasta semajno de la Konferenco!

MEMBERS & READERS: Many library subscriptions to AE expire with this issue. For effective Esperanto publicity renew your library subs. now.

ESPERANTO EN AŬSTRALIO

PASTRO GABRIEL N. PAUSBACK, O. KARM.

Dum multaj monatoj *La Tre Respektinda Pastro Gabriel N. Pausback, Ordeno de Karmelitoj*, jam deĵoris en Aŭstralio. Tie, kiel ĉie kie li troviĝas, li helpas kaj partoprenas en la Esperantomovado. *Amerika Esperantisto* ĝoje anoncas ke li konsentis esti Kunredaktisto en nia stabo.

Raporto pri la Esperanto-movado en Aŭstralio ne estas malagrabla tasko, speciale dum ĉi tiuj tagoj de granda interhelpo inter la du landoj. Kvankam la vasta lando Aŭstralio ne havas pli da enloĝantoj ol la *urbo* Nov-Jorko, tamen estas mirinde ke la Aŭstralianoj jam faris kaj ja faras tiom multe por la milito. Se miaj humilaj vortoj helpos nin pli bone koni kaj ŝati unu la alian, mi sentos min kontentega.

Nu, pri miaj ĝuindaj vizitoj ĉe la Melburna E. Klubo — ĝuindaj, ĉar, ekde la komenco ĉio iradis en maniero la plej eble kora. Unue, la letero de S-ro R. Rawson, delegito, belege respondis Esperante al mia demando. Poste telefonis al mi S-ro H. M. Cohen, sekretario de la Klubo, instigante min al vizito ĉe la klubejo. Kiam mi fine povis ĉeesti, mi trovis multe da tre amikaj samideanoj, kiuj preskaŭ ĉiuj parolis Esperante. Oni tuj min faris honora membro dum mia restado en la urbo. La vespero pasis kun multa plezuro, malgraŭ mia malfacileco kompreni ĉion, kaj diri tute tion kion mi volis. Facile oni komprenos, ke mi ĝojis pensi pri la gesamideanoj kiujn mi lasis en Nov-Jorko; tial, dum mia unua vizito, je la peto de la estroj, mi babilis pri la Nov-Jorkaj samideanoj kun korinklino kaj entuziasmo. La seriozeco je ĉi tiuj Merkredaj Esperanto-vesperoj faris al mi grandan impreson.

Estas alia bona kutimo ĉi tie: la "Rendevuo", kiu okazas je la lasta Vendredo ĉiumonate, kaj havas kiel la solan regulon, "Ni ĉiam parolu Esperante!" En la unua de la rendevuoj kiun mi povis ĉeesti, mi estis

honorata legi skribadon pri temo mem-elektita. Prenante iom da ekzemploj de la "Rondo" (Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio), mi speciale elektis artikolon favoran al la *eŭtenasio!* Mi penis montri ke oficiala organo de Esperantismo devas teni sin *tute neŭtrala*; pro tio, ke dum ĉiu Esperantisto volas helpi laŭ sia ebleco la Esperantan movadon, li ne volas — kaj iufoje ne povas morale — antaŭenpuŝi la pensadon kaj movadon de ĉiu kun-Esperantisto. La eŭtenasio, ekzemple, estas kontraŭ la penson kaj eĉ la mem-konsciencon de ĉiu Katolika Esperantisto; ĉar, laŭ nia kredo, la eŭtenasio estas, estis, kaj estos ĉiam simple murdo. Ni ne povas ŝati tiajn temojn en "niaj" gazetoj! . . . La vespero estis vive interesa! Bedaŭrinde, mia laboro min fortenis el aliaj tiaj rendevuoj.

Tre plezuriga kunveno estis ankaŭ la festvespero je la naskiĝa datreveno de D-ro Zamenhof, kiam mi, kiel vizitanto de Usono, havis la honoron ĉeesti kiel gasto. Alia honorita gasto estis F-ino Tilly Aston, tre bone konata samideanino, poetino, kaj blindulino, kiu efike uzadis Esperanton por interŝanĝi internacie ideojn kaj planojn por helpi al la kun-blinduloj.

Ni ĝuis la programon — kuraĝigaj raportoj, kantado kaj muziko, gratuloj al atesto-gajnintoj, babilado inter ĉiuj, kaj (neeviteble en Aŭstralio) "prenante teon". Ree rigardante, mi vidas ke tiu vespero donis al mi novan spiriton Esperantan; estis vere kuraĝiga povi miksiĝi tiel libere kun alilandanoj antaŭe ne konataj, kaj

inter ili ne nur Aŭstralianoj! La Esperanto-movado estas pli, tre multe pli, ol simple lingvo-disvastigo; ĝi ja estas propagando de paco kaj bonvolo inter la homaro, aŭ pli bone, inter la frataro de Kristo.

Estas aparte memorinda, inter la okazintaĵoj, la apero de la *Jarlibro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio*, N-ro 3, 1944. Kvankam mimeografita, ĝi min faras iom envia, kiam mi ne povas memori pri io simila en Usono. Ĝi estas certe granda propagandilo inter la membraro Aŭstralia. Inter la enhavoj estas: la tuta Statuto

de la Asocio; raportoj pri "*La Rondo*" (oficiala organo); traduk-konkursoj; korespond-kursoj; kaj pri la Delegito-Servo de IEL. Ĝi sciigas ankaŭ pri la Libro-Servo, la Propaganda Fako, kaj la ekzameno-reguloj de BEA (kio ankaŭ validas je AEA). Sekvas kontoj de la Generala Kaso, Listo de Diplomitoj (57), kaj fine la Adresaro de proksimume 350 membroj (4 el kiuj loĝas en Fingio). Kompreneble, enestas plue paroladoj de la estroj de la Asocio — vortoj de kuraĝigo kaj espero. Vivu kaj kresku tiaj laboroj!

ESPERANTO EN BELGUJO

D-RO FERNAND ROOSE

La Esperanto-grupo "Paco kaj Justeco" en Brugge, sekcio de Flandra Ligo Esperantista, daŭrigis disvastigi Esperanton kaj la ideojn de la Esperanto-movado dum la tuta tempo de la germana okupado. Ni eĉ eldonis "subtere" multobligitan ĵurnalon, kiu estis ĉiam, mi kuraĝas diri, tre interesa. Ni klopodis konstrui ideologion de la Esperanto-movado. Ni lernis, por tiel diri, pensi kaj vivi internacie. Ni pliprofundigis nian konon de la persono de D-ro Zamenhof. Artikoloj pritraktis arton, historion, filozofon, ktp. Ni povis fari ĉion ĉi ĉar ni havis kun ni kelkajn junajn studentojn idealistajn, kiuj estis konvinkitaj Esperantistoj. Nia grupo konsistis el proksimume dudek gejunuloj. Bedaŭrinde niaj du plej bonaj

propagandistoj estis devigitaj foriri al Germanujo por sklava laborado en 1942 kaj 1943. Ja ne estis eble por ĉiuj forkuri de tio, kaj en tiu tempo mi ankoraŭ ne havis la eblecon kaŝi kaj manĝigi ilin. Mi povis tion fari pli malfrue por aliaj.

Nun en Belujo la Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj kaj la alia el la du belgaj organizoj Flandra Ligo Esperantista jam rekomencis sian agadon. Mi ankoraŭ ne vidis vivsignojn de aliaj grupoj. Sajnas al mi ke la organiza problemo estos denove sufiĉe malfacila. Mi sendos al vi kelkajn ekzemplerojn de nia revuo. Mi legis kun la plej granda intereso la eltranĉaĵojn el "Amerika Esperantisto", kaj mi volonte kunlaboros en tiu ĵurnalo.

SENDU LA NOVAĴON: Se via klubo deziras mencion, ni petas ke la sekretario aŭ alia reprezentanto sendu raporton al "AE". Ni deziras presi la novaĵon pri ĉiu grupo kaj kunveno. Skribu koncize (prefere skribmaŝine) sur paperon 8½ x 11. Lasu spacojn inter la linioj. Sed sendu.

AMIKOJ EN ĈINUJO PER ESPERANTO

Serĝento HAROLD SCHROEPPLE

Post longa vojaĝo tra Nord-Afriko, Hindujo kaj trans la montojn "Himalajo" mi alvenis al la urbo Kunming, Ĉinujo. Pasis kvar monatoj antaŭ ol mi trovis Esperanton en Ĉinujo, kaj tiam pere de novaĵo pri ĝi en la "Amerika Esperantisto"!

Mi skribis tuj al la "Heroldo de Ĉinio" kaj oni prezentis min al S-ro Ĉang-Ĉen-Ĉiu, kiu laboras en la oficejo de la "War Area Service Command". Li ĝentile akceptis min kaj prezentis min al S-ro Li-Ŝan-Bin, juna fraŭlo, kiu instruas Esperanto-klason tri vesperojn semajne, kaj nuntempe ankaŭ klason ĉe la Universitato. Tuj komenciĝis interesaj spertoj kune kun la Ĉinaj Esperantistoj: piknikoj, vespermanĝoj en la urbo, kaj ekskursoj. Plej ĝuinde estis ekskurso per "Sam-

pan"-boato al la templo "Dah-Lee-Ĉun" kune kun la nove formita "Kunming-Esperanto-Rondo, vespermanĝo en tre ĉarma restoracio (kie mi penis pagi la kalkulon kaj S-ro Li kaptis miajn manojn dum S-ro Ĉang pagis), kaj "Zamenhof-Vespero" kie S-ro Li kaj mi kantis duope la himnon "L'Espero". Nek li nek mi kantis tro bone, sed ni multe amuziĝis! (Iam mi intencas lerni tiun himnon!) Poste la grupo kantis ĉinajn kantojn.

Mi restis en Ĉinujo unu jaron. Mi tralegis kvin-jaran kolekton de la "Heroldo de Ĉinio" por ke mi lernu ion pri la Ĉina popolo. Mi tre ŝatas la ĉinojn; ili estas tre ĝentilaj kaj havas mirindan kapablon por humoro. Esperanto estis por mi vera ŝlosilo al la koroj de la Ĉinaj Esperantistoj.

SIGNOJ DE REVIVECO EN ITALUJO

Kaporalo DAVID JAGERMAN

La itala movado antaŭmilita estis sufiĉe antaŭenpelita, por ke ĝi estu konsiderata grava.

La "Federazione Esperantista Italiana", malforte kunligita konfederacio de lokaj grupoj, eldonis sian oficialan gramatikon "Manuale Pratico D'Esperanto In 12 Lezioni". Ĝi gvidis multajn komencajn kaj daŭrigajn kursojn en gravaj institutoj kaj universitatoj. En suda Italujo, oni eldonis la ĵurnalon "Corriere Balcanico-Esperantista". Entute la movado progresadis kontentige.

Je la povogajno de Mussolini, oni rigardis la verdstelo-portantojn malfa-

vore, finfine ĝis tia grado ke ĉiu Esperantisto ankoraŭ portanta la verdan stelon riskis perdi sian oficon. Kompreneble sub tiaj kondiĉoj la movado devis subteriĝi. La kursoj finiĝis. La belaj, altkvalitaj, literaturaj ĵurnaloj ĉesis eldoniĝi; sed la movado ne mortis. Ĝi ankoraŭ vivetis.

Nun kun la detruo de la reĝimo de Mussolini kaj la enkonduko de liberigaj trupoj de Usono, Anglujo, kaj Rusujo, oni spiras multe pli libere; denove oni povas vidi la ekbrilon de la verda stelo. Jam en Bari kaj Taranto, grandaj havenurboj, komenciĝis regulaj kursoj por la ellernado de Es-

peranto. Unu kurso daŭros unu jaron en la universitato de Bari, alia daŭros du jarojn en la Instituto de Alilandaj Lingvoj de Taranto. La plej grava librotenejo por Esperanto "San Vita di Tagliamento" funkcias denove per la tuta Italujo.

Tiuj ĉi signoj de reviveco donu al

ni esperon kaj forton por ankoraŭ pli forte laboradi por antaŭenpuŝi la movadon en niaj propraj landoj, kaj ili aplaŭdigu nin por tiuj sindonaj samideanoj kiuj, dum la plej nigra kaj premiga tempo de sia lando, ankoraŭ tenadis viva la ĝermon de la Esperantismo.

ESPERANTO DENOVE FLORAS EN FRANCUJO

Leŭtenanto CHARLES E. SIMON

Kelkajn tagojn post mia alveno en Parizo, malfrue en la monato Septembro, mi min dediĉis al la serĉo por la konataj samideanoj de la franca ĉefurbo. Mi komencis kompreneble per la ĉefo de la tutmonda Esperanto-movado, Intendant-Generalo Louis Bastien, prezidanto de IEL. Telefonalkvoto atingis lin rapide, kaj kelkminuta konversacio certigis al mi ke li ankoraŭ estis bonsana kaj vigle laboris kiel antaŭe por la plivastigo de Esperanto. Li invitis min veni al li, kaj tie mi renkontis kelkajn konatulojn de la franca samideanaro.

Mi vizitis ankaŭ la sidejon de la SFPE, en la strato Chabrol, kie dum la tuta okupado la gesamideanoj renkontiĝis dufoje semajne. Tie mi trovis veran centron de agado — klaso de komencantoj, kaj multaj novaj Esperantistoj — ili ĉiuj fine povis kontaktiĝi malkaŝe kun aliaj gesamideanoj, kaj por ili estis kortuŝa sperto libere interparoli kun aliaj Esperantistoj, francaj kaj eksterlandaj.

La 5-an de Novembro, okazis la festo de la Liberigo, en la sidejo de SFPE. Partoprenis ĉiuj eminentuloj de la franca movado. Aperis tiun feliĉan tagon la unua liberiga numero de *Franca Esperantisto*. Estis tre agrabla arta programo, kun belaj kantoj, de-

klamoj kaj paroladetoj, kiuj tre bone ŝpeguligis la ĝojon de la liberigitaj gesamideanoj.

Iom post iom la reorganizado de la francaj asocioj, lokaj kaj federaciaj, realiĝis. Esperanto-klasoj floris. Kune kun F-ino Huguette Royer, mi estis invitita fari Cseh-Kurson en la fama Amfiteatro de Geologio. Post iomete da propagando en civilaj kaj militaj rondoj, ni faris la unuan provlecionon, la 6-an de Februaro. Ĝi estis bone ĉeestata kaj de francoj kaj de usonaj oficiroj kaj soldatoj. Nia celo estis unuigi grupon de francoj kun unuj soldatoj de la diversaj militaj oficejoj diversnaciaj en Parizo, kiuj ne parolis france, kaj ebligi al ambaŭ grupoj lerni interparoli per facila Esperanto.

La 11-an de Marto, la unua federacia konferenco de la franca Esperantistaro okazis en Parizo. Sed tio estis nur antaŭ ĝuo por la unua postokupada tutlanda kongreso, kiu okazos en la Sorbonne, la 1-an kaj 2-an de Aprilo. Tiam ili faros planojn por la post-milita periodo. Ne povas esti ia dubo ke la franca samideanaro daŭrigos fari sian altvaloran kontribuon al nia tutmonda movado. Honoru al niaj kuraĝaj kaj fidelaj francaj gesamideanoj, la unuaj liberigitaj Esperantistoj de Eŭropo!

INTERVJUO KUN GERMANA ESPERANTISTINO

Soldato D. B. RICHARDSON

Tauberbischofsheim, Germany. — Ĉi tie oni permesas, ke Usonaj soldatoj parolu kun Germanoj nur kiam estas "laŭ neceso de aferoj". Konversacio, aŭ vizitoj ĉe hejmoj, estas intence malpermesataj. Sed kiam mi aŭdis de kunulo ke li hazarde renkontis Esperantistinon nur kvin mejlojn for, mi tuj decidis paroli kun ŝi, por lerni kiel fartis 'Nia Afero' dum la jaroj de Hitler-regado. Do, kiel aranĝi la kontakton? Kaj tiam mi memoris: Ĉu mi ja ne estas "eksterlanda raportisto" por *Amerika Esperantisto*? (S-ro Connor sugestis ke mi sendu raportojn.) Ne sciante ĉu tiu fakto kontentigos la aŭtoritatojn tiel facile kiel mian konsiencon, mi konvinkis kunulon preni "jeep"-on kaj min veturigi la kvin mejlojn.

Mia intervjuotino, kies nomo mi ne mencias, aperis ĉe la urba gastdomo responde al mia peto, en laŭmoda vestaĵo kaj kun kelkaj Esperantolibroj sub la brako. Dum jaroj, ŝi klarigis, pro la postuloj de la milita tempo ŝi parolis nenium vorton en Esperanto, kaj ŝia parolo estis haltema, tamen facile komprenata. Mi esperis trovi almenaŭ unu germanon kiu restis fidela; kiu travidis la Hitler-instruojn. Sed mi seniluziiĝis. Al la demando, "Kiam vi lernis Esperanton?", ŝi respondis, "Estis en 1938." Mi demandis, "Kaj kiam oni malpermesis Esperanton en Germanujo?" La respondo: "En 1935, proksimume." Mi surprizi-

ĝis; ĉu ŝi do lernis sekrete? Ne, tute ne. Mi eltrovis ke nur kunvenoj, klasoj, publikaj reklamoj, ktp, estis malpermesataj. Libroj ne plu estis presataj, sed ŝi trovis lernolibrojn, legolibrojn, kaj vortaron, sen ia malfacilaĵo. Kaj neniu ĝenis ŝin pro tio ke ŝi estis Esperantistino.

Kial ŝi lernis Esperanton? Nu, ŝi estis malsana unufoje kaj havis nenion alian por pasigi la tempon. Ŝi jam lernis la francan, italan, kaj latinan lingvojn, kaj Esperanto ŝajnis facila. Foje ŝi parolis kun kelkaj holandanoj, ĵus antaŭ la milito ŝajne. Post kelke da tempo, ŝi komencis paroli pri politiko. Tiam mi *entute* seniluziiĝis. Estis klare, ke ŝi estas nur plia ano de la Nazi-partio; ke ŝi same kiel la aliaj, tiom multe endoktriniĝis je la distordita germana pensmaniero, ke ni ne trovos helpon de ŝiaj tipuloj por resanigi la landon. Mi provis rektan demandon: "Ĉu vi ne kredas ke la paco estas pli bona ol milito?" Post ioma hezito venis la respondo, videble gardita: "Je-es, sed ne estas bone kapituli!"

Mi iris de la intervjuo kun unu konkludo: Se eĉ Esperantisto povas konservi malamon, kredi je la absurdaj ideoj de la lastatempa Hitlera Germanujo, kaj iĝi ja militama — do neniu povas kredi ke ni estos gajninta la pacon ĝis tiam kiam la lando (kaj ĉiu en ĝi) refandiĝos laŭ la postuloj de la pacamaj popoloj de la mondo.

GAZETOJ RICEVITAJ: *Interna Bulteno*, Apr-Jun '45, Palestino. *La Verda Flamo*, 1-a n-ro '45, Maroko. *Per Unu Voĉo*, Apr '45, Sud-Afriko. *La T.J.O.-Bulteno*, Maj-Jun '45, Tutmonda Junular-Organizo. *Heroldo de Ĉinio*, Okt '44, *British Esperantist*, Maj-Jun '45. *Argentina Esperantisto*, Jul-Okt '44. *Renovigo*, Maj '45, Meksiko. *Pernambuco Esperantista*, Okt-Dec '44. *Irlando Vokas*, Jun '45. *O Brasil Esperantista*, Okt-Dec '44. *Esperanto Internacia*, Mar-Apr '45.

MIA HUNDO

DIANTO CHOMETTE

Tre juna verkisto estas *Dianto Chomette*. Si estas 13-jara filino de *Germaine kaj Charles Chomette* en Los Angeles. Si havas fratinton *Lilio*, kiu ankaŭ estas Esperantistineto. Tra la tuta mondo oni konas la familion *Chomette* kiel veran *Esperanto-Familion*. La jena rakonteto estas originala Esperanta verketo de *Dianto*.

Mi havas hundon kiun mi nomas "Amiko". Li estas fos-hundo, kaj baldaŭ estos bona gard-hundo. Li estas preskaŭ tute blanka escepte de tri nigraj makuloj sur lia dorso. Lia kapo estas nigra kaj bruna.

De kiam mi ricevis lin, mi parolis al li en Esperanto. Li komprenas ĉion kion mi diras al li, kvankam li ne ĉiam obeas. Kiam ni eniras en la aŭtomobilon, li ĉiam estas la unua por eniri. Li tre ŝatas rigardi tra la fenestro apud mia patrino.

En la mateno kiam ni leviĝas, li estas tre ĝoja vidi nin, kaj saltas tre alte. Li scias kie liaj biskvitoj estas, kaj kiam ni mencias ilin, li saltas apud la skatolo.

Unu el liaj plej valoraj posedaĵoj estas malnova pantoflo kiun ni donis al li. Li ŝatas skuadi ĝin tre forte. Post ĉiu manĝo li volas sidi sur la genuoj de unu membro de nia familio. Post la vespermanĝo li estas tre kvieta kaj dormema, kaj volas dormi apud la persono kiu faras plej komfortan kusenon por li, kaj li ŝatas tuŝi iun dum li dormas.

Unu el liaj preferataj pastempoj estas ludi pilkon kun mia fratino *Lilio* kaj mi mem. Alia estas tre granda ĝojo por li, tio estas forkuri por ke ni kaptu lin. Li estas tiom rapida kaj ruza ke neniu povas kapti lin. Ni tre amas nian hundon "Amiko", kaj esperas ke li vivos longe.

Friendly Tips for Students:

1. Here it is again! The little word *jen!* Remember? It was used last time as an exclamation to "point out" or to "draw attention to". In its adjectival form, *jena*, it does the same thing: *La jena rakonteto . . .* (The following little story . . .).
2. Today's Special: In Esperanto, when a title or other similar word in the *accusative case* (with the -n) is found before a proper name, the proper name is in the *nominative case* (without the -n) if the word *nomatan* (named) is expressed or understood. Examples: *Si havas fratinton Lilio.* (She has a sister named Lily.) *Oni konas la familion Chomette.* (. . . named Chomette.) *Ni tre amas nian hundon "Amiko".* (We greatly love our dog named "Friend".) — Other examples: *Mi preferas la lingvon Esperanto, la Doktoron Harris, la urbon Stokholmo, k.t.p.*

ESPERANTO-KRONIKO

Novajo el Hindujo sciigas nin ke Edgar Simon de Klevlando fariĝis antaŭ nelonge Kapitano en la Usona Armeo. Gratulon!

V-letero de Serĝento Kenneth Anderson informas nin ke li estas "ie en la Pacifiko" kaj jam ricevis kelkajn numerojn de AE.

En Lakoto, Nord-Dakoto, S-ino Andrew L. Freeman pasigis semajnfino de libertempo, kaj antaŭ ol ŝi forlasis, jam iniciatis Espo-klason.

Nova Esperanto-Kurso komenciĝis en Nov-Jorko ĉe la ILGWU-Domo. F-ino Agnes Cervello aranĝis la kurson, kaj Ralph Bonesper estas la instruisto. Jam registris 20 personoj.

Intervjuo pri Esperanto ĉe Stacio WEEI en Bostono, okazis Vendrede la 15-an de Junio. Oni intervjuis F-inon Orloff, kiu klarigis pri sia intereso en Esperanto kaj pri Esperanto tra la tuta mondo.

Esperanto ĉe la YMCA en Klevlando, Ohio. Profesoro Frank Tomich de Fenn-Kolegio parolis antaŭ grupo de junuloj, la "Gra-Y" grupo, pri Esperanto kiel lingvo necesa por interkomunikado inter ĉiuj nacioj.

Restarigo de la Esperanto-Klubo de Seattle estas la klopodo de S-ro Byron Ela, Pastro Shorter kaj S-ro W. G. Adams. S-ro Ela estas la prezidanto, kaj la Klubo kunvenas ĉe la preĝejo de Pastro Shorter.

Letero de la Prezidanto aperas nenur en AE, sed ankaŭ en la "Tampa Tribune", de Tampo, Florido. Prezidanto D-ro Stockard skribis pri Universala Lingvo kaj Esperanto, respondante al letero de S-ro H. P. Ayres pri la problemo. Depost tiu tempo, D-ro Stockard jam ricevis kelkajn petojn pri Esperanto, kaj S-ro Ayers nun studas Esperanton kaj jam aliĝis al EANA. Bona laboro!

El suferanta Grekujo venis letero al S-ro W. Vathis de la konata Esperanto-pioniro Anecreon Stamatia-des. Ni ĝojas aŭdi ke S-ro Stamatia-des ankoraŭ vivas kaj laboras por Esperanto.

Esperantista Paro, kiuj profesie pentras bird-bildojn kaj paroladas pri la "Belaj, Unikaj Birdoj de Ameriko", estas Joy Postle Blackstone kaj Robert Blackstone. Ili loĝas en Florido, sed vagadas ankaŭ tra la tuta Usono pro sia interesa laboro.

En la Esperanto-Societo de Detroit, D-ro Solzbacher, kunredaktoro de AE, faris la 29an de Majo paroladeton pri la lingva problemo en internaciaj kongresoj kaj konferencoj. La kunveno okazis en la hejmo de Gesinjoroj R. Davis.

John P. Robertson, Usona Esperantisto, kiu restis en Svisujo ekde la komenco de la milito, skribis ke li partoprenis multajn konferencojn kaj ekskursojn kune kun Svisaj Esperantistoj. Li sendas salutojn al siaj amikoj en Usono.

En la ĵurnalo "Danubian Review", aperis diversaj artikoloj pri Esperanto. La unua estis verkita de la redaktisto, D-ro George Strem. La aliaj estis represitaj de AE: "Esperanto en Jugoslavio" kaj "La Lingvo-Problemo en Post-Milita Planado".

'Esperanto en tri lecionoj' estas la nova moto de S-ro Robert Alberg de Lynn, Masaĉusetato. Li gvidis tiun "kurson" ĉe Phillips Brooks House, Harvard-Universitato, Majo la 16an, 23an kaj 31an. Ĉeestis lingvo-studentoj. La tri lecionoj konsistis el: (1) La tuta gramatiko (krom la kunmetitaj verboj); (2) Ekzercado de la gramatiko; (3) Legado, tradukado. (Ili sukcese legis la gazeton "Praktiko" de la Cseh-Instituto.) Subleŭtenanto Joseph Gamble kunhelpis.

Esperanto Publicity Fund

In our issue of March-April 1945, we launched an appeal for support of Publicity for Esperanto at this crucial time. Thanks to several new and old friends we were able to start that fund with \$70 on hand. Since that time we have received a good many other donations. The sum is not yet too impressive, but we wish to thank all those who have so generously contributed, and to remind others that their little bit will help, too! The following contributions received bring the fund to a grand total of \$211: Dr. Cecil Stockard, \$95; T/4 Francis H. Sumner, \$10; J. H. Murray, \$4; Hal Ewen, \$2; C. M. Price, \$1; Robert Karlson, \$5; Capt. J. W. Wood, \$1.

The Publicity Fund activities to date: Over 300 copies of March-April 1945 AE, sent with letters to all the U. S. Delegates to the San Francisco Conference, and to leaders of Organizations interested in International Affairs; 300 copies of May-June 1945 AE, with letters to educators and linguists in the U. S.

Remember that this work is a long-range *publicity* effort, and we may expect to reap further benefits in good-will and knowledge of Esperanto after the follow-up. Several immediate results are: four memberships to EANA, two subscriptions to AE from University Professors, and a letter from the Camp Fire Girls of America asking Dr. Stockard to write, in Esperanto, a message on World Friendship to be read to the girls during camp this summer. Our next step will be the placing of ads in newspapers throughout the country to acquire new members and students of Esperanto. Complete statement of donations and expenditures will be printed in the Fall. Send your donation.

DEZIRAS KORESPONDI

Anoncetoj pri korespondado el Usono kaj Kanado kostas 25 cendojn por 4 linioj. El aliaj landoj, de kie estas nun malfacile sendi monon, AE akceptas anoncojn senpage. La redaktisto rezervas al si la rajton fini tiujn privilegiojn je iu tempo.

Svedujo. S-ro Einar Adamson, redaktoro, Vaermlandskatan 18, Goeteborg, dez. kor. pri ĉiuj temoj kaj interŝ. PM, gazetojn, librojn. Ankaŭ serĉas kor. por siaj kursanoj.

Ĉinujo. S-ro Li-San-Bin, 13 Gwang Hwa St., Kunming, Yunnan, 23-j. fraŭlo dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Ĉinujo. S-ro Ĉang-Ĉen-Ĉiu, 1 Li Zen Han, Ching Nong St., Kunming, Yunnan, 30-j. dez. kor.

Francujo. M. Jeanne Dedieu, Profesoro, 23 rue Victor Hugo, Prades, Pyr. Or., estas estro de la Franca Korespond-Servo, kaj dez. nomojn de personoj kiuj dez. kor. kun francaj samideanoj. Priskribu iom viajn interesojn kaj detalojn pri vi mem.

Francujo. S-ro Adrien Boucheras, 6 rue d'Alger, Thiers, Puy de Dome, dez. kor. kun Esp-istoj en Kanado, Meksiko, Kubo, Usono, k.t.p.

Palestino. S-ro Y. Armoni, 72 Arlosoroff St., Haifa, dez. kor.

Usono. S-ro Wm. Knox, Circle Pines Center, Cloverdale, Michigan, dez. interŝ. informon pri popolaj kolegioj, kooperaj societoj kaj komunumoj en ĉiuj landoj.

Belgujo. D-ro Fernand Roose, profesoro, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge, dez. kor. pri historio, geografio, internaciaj problemoj, religioj.

Belgujo. F-ino Henriette De Kersgieter, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge, kun kuracistoj kaj flegistinoj, pri akuŝado.

Belgujo. F-ino Marie-Therese Roose, Guido Gezellelaan 15, Brugge, kun fraŭloj kaj fraŭlinoj.

ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction	.75c
ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps	.25c
PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations	.25c
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages	\$3.50
AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion	.30c
ESTU PRETA, by George J. Falgier. A splendid <i>key</i> , with grammar, and considerable fundamental teaching	.10c
"LA ESPERO," Esperanto Song. Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings	.15c or 2 for .25c
"LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation.	.10c or 3 for .25c
EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages	\$1.00
STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best. Paper covers	.75c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition, 1945.	\$3.50
STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.	
INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center	.45c
HOME STUDENT RECORDS—made in Europe. No more available.	
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
"ESPERANTO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. Over 300 hymns, original Esperanto and translations of well-known English hymns	.45c

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist". \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the Jarlibro (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships. Total for all above, \$4.00.

I..... Date.....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and enclose subscription (indicate class and amount)

.....

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

1410 H St., N. W., Washington, 5, D. C.

Regarding international conferences, Dr. Edmond Privat observes as follows: "Comparing conferences where only Esperanto was used, with others hindered by unceasing translations or misunderstandings (like San Francisco), the difference impresses one profoundly. In multilingual conferences the languages of the great powers always dominate. The rest often stutter uneasily, speak with errors and in a depressive manner, in foreign tongues. They always fear they will offend or create laughter, among those whose mother tongue they unwittingly distort."

"From a psychological viewpoint, fear still further hampers and embarrasses them. Instead of thinking about their subject, they must constantly be careful to avoid error, find a word, ask themselves whether the moon is masculine and the sun feminine, whether the verb is regular or irregular, etc. Fear is the enemy of fluency and clarity. It causes embarrassment, repetition, delay and confusion. If one wishes more assurance, and reads the manuscript, the audience grows weary."

"The most important advantage of Esperanto was that it eliminated the 'psychological barrier'. Each delegate, even from the least known language-group or the smallest nation, felt himself equal with the rest, because for no one of them was Esperanto a mother tongue. They did not fear error! That was the secret. And for that reason the whole affair progressed admirably, as though in a national one-language convention."